


The
NORTH AMERICAN
ESPERANTO REVIEW



ĉe ŝiaj piedoj---

NORDAMERIKA ESPERANTO-REVUO

Julio - Aŭgusto • 1957

V.4

NI PETAS

KE ONI ATENTU LA ADRESON
DE LA REVUO

La adreso citita en la Jarlibro de UEA, 1957, estas malnova adreso de nia *literatura redaktoro*. Lia nuna adreso:

D.B. Richardson, 3412 North Mullen,
Tacoma 7, Washington, Usono.

La nuna adreso de la *Revuo* estas:

North American Esperanto Review
2116 North 35th St., Seattle 3, Wash.,
Usono.

The North American Esperanto Review

Published bi-monthly by the ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., as its official organ. Subscription free to members. Subscription for non-members: \$1.75 per year. Other rates: Bulk orders of 15 or 30 copies of any issue may be ordered, in advance, by members, for 60c and \$1.00 respectively; gift subscriptions for schools, libraries, eminent persons, etc., and for Esperantists living in countries outside of North America, may be purchased by members for 30c per year. (The *Review* reserves the right to refuse gift subscriptions for persons who should pay the higher rate.)

THE ESPERANTO LEAGUE FOR NORTH AMERICA, INC., is a non-profit organization to encourage the use of the International Language, Esperanto. *Secretary*: Conrad Fisher, RFD 1, Meadville, Pa.; *Treasurer*: Edward W. Pharo, Jr., 220 County Line Rd., Somerton 16, Pennsylvania.

Membership Dues: Regular Members, \$3.; Supporting Member, \$5.; Patron, \$10; Life Member, \$50; Man and wife, each having privileges of Regular Member, but receiving only one copy of publications, etc., \$4.00.

Make all checks and money orders payable to "Esperanto League for North America, Inc."

NOTO: Korespondpetoj, kiuj aperas sub "Bonvolu Skribi", estas senpagaj. Por aliaj anoncoj aŭ reklamoj: ĝis sep linioj de unu kolono, \$1; pli ol sep linioj ĝis ¼-paĝo, \$5; ½-paĝo, \$10; unu paĝo, \$20. El landoj, el kiuj oni ne povas sendi monon, oni sendu la valoron per neuzitaj poŝtmarkoj, aŭ similaj valoraĵoj, al: Conrad Fisher, Route 1, Meadville, Pennsylvania, Usono.

The North American Esperanto Review

(Nordamerika Esperanto-Revuo)

Vol. 5, No. 4.

July-Aug., 1957.

The Review not only permits, but invites, reprinting of material from its pages, except where special notice, such as notice of copyright, appears.

La Revuo ne nur permesas, sed invitas, represon, escepte kie aperas speciala noto limiga pri kopiado.

CONTENTS (English)

Help !	Page 3
Esperanto Vagabonds in Europe	6
Local Addresses	9
New York, City of Wonders	12
Tape Recorders, Attention !	14
Complete Grammar and Pronunciation of Esperanto	Inside Back Cover
ENHAVO (Esperanta)	
New York, 1957	Paĝo 2
Balotrezultoj	4
Nia Prezidanto Salutas	4
Aventuroj por kaj per Esperanto	5
Historio	7
Mesaĝo de l' Prezidinto	8
Bonvolu Skribi (Korespondpetoj)	9,11
Lokaj Adresoj	9
Trans la Lingvajn Barilojn	10
"English Spoken"	15
Por Rimistoj	16

The NORTH AMERICAN ESPERANTO REVIEW

Vol. 5

July-August, 1957

No. 4



La Prezidinto Salutas la Prezidonton

New York, 1957



Fine de la kongreso, parto de la kongresa grupo fotografiĝis ĉe la piedoj de la Diino de Libereco. Via redaktoro (kun blanka ĉapelo) sidas tute maldekstre. La granda viro grize vestita, staranta apud li, estas S-ano Glenn Turner, "Sinjoro Butontruulo".

NIA KVINA KONGRESO komenciĝis en la ombro de OUN, finigis ĉe la piedoj de la Diino de Libereco. La influoj de ambaŭ estis senteblaj dum la tuta kongreso.

La plej gravaj decidoj de la kongreso:

1. Ke la sekretario de ELNA, ne pli ol 60 tagojn post la kongreso, sendu al ĉiu membro liston de nomoj kaj adresoj de ELNA-anoj. Tio plifaciligos kunlaboradon por Esperanto kaj samtempe, laŭ la tradicia demokrateco de ELNA, ebligos al la membroj senpere interŝanĝi ideojn pri la aferoj de la Ligo.

2. Ke ELNA, kunlabore kun UEA, konstante provizu al altaj postenuloj de OUN en New York informojn pri progreso de la esperanta movado. Tiel la du plej gravaj provoj por amikeco inter la popoloj

de la mondo povos pli bone kunlabori.

Sendube la ĉefa evento de la kongreso estis la oficiala akcepto al la kongresanoj ĉe OUN, fare de S-ro Aŝraf, Direktoro de Publika Informado. S-ro Aŝraf klarigis la funkciadon de OUN, kiel organizaĵo dediĉita al plibonigo de rilatoj inter la popoloj de la mondo, ne nur inter registaroj. Jen ideo bone konata inter liaj aŭskultantoj!

Aliaj interesaĵoj de la kongreso:

Ŝipekskurso ĉirkaŭ Insulo Manhattan; neplanita kantfesto post vespera kunsido; duonhora radioprogramo pri Esperanto; belaj lumbildoj pri la vojaĝado de la familio Doneis.

Glenn Turner, pli bone konata kiel "Esperanto League Book Service", gajnis la titolon "Sinjoro Butontruulo", ĉar kiam
(daŭrigo sur paĝo 15)

HELP!

CAN YOU HELP TO DEVELOP the Esperanto movement in a region which is rapidly becoming one of the most important to the peace of the world?

Former colonial areas in Asia and Africa feel the need of an international auxiliary language to maintain and to develop their cultural contacts with other nations. *But they want their contacts to be on the basis of recognized equality of peoples.*

Their previous contacts have been through the use of the languages of nations which they (rightly or wrongly) consider as oppressors. The time has come for them to talk with the Western world in a language which does not imply superiority of Western culture over their own.

This problem is particularly acute among the Arabic peoples. The growth of the nationalist spirit among them may be a great revitalizing influence, or a grave threat to world peace. *The choice is largely ours.* If the peoples of the West insist on use of Western national languages, the development of the Arab world will be apart from and antagonistic to that of the West. But on a basis of a neutral auxiliary language, neither ours nor theirs, the contact of cultures may well bring a new Renaissance.

Have you, or can you find, a copy of an Esperanto grammar in the classical Arabic language? Such a book was published about 1932, but is long out of print and no longer obtainable through ordinary channels.

Mr. Charles Thollet, fraternal delegate from Morocco to the ELNA Congress, reports that there are Esperanto classes in Marrakesh, Casablanca, Rabat, Port

Lyautey, Meknes and Oujda. But students must be taught from French textbooks. *They do not like this.*

Mr. el Fassi, Moroccan Minister of Education, favors the teaching and use of the neutral international auxiliary language, Esperanto. Mr. el Fassi has informed Mr. Thollet that he will help in the work *if Mr. Thollet can show him a grammar of Esperanto in the classical Arabic language.* Mr. Thollet will arrange republication of the book if he can secure a copy of the original. This will serve not only for Morocco, but for all Arabic nations.

Look through your old books *now.* Keep your eyes open for it when in old book stores or rummage sales of old books. Even if you are not an Esperantist, you may have this book, picked up as a curiosity and then laid aside years ago.

Anyone who finds a copy of this book should send it immediately to:

MR. CHARLES THOLLET,
49 Rue Albert 1^e,
Port Lyautey, Morocco.

YOU may be the one to provide the basis for a peaceful and friendly exchange of ideas between the peoples of the Arabic nations and those of the Western world.

Esperanto League for North America

is building an effective movement in North America for

We need your help

ESPERANTO NOW!

Join now

BALOTREZULTOJ

PREZIDANTO

Doneis	50
Lewine	40

VICPREZIDANTO

Brink	62
Hughes	26

SEKRETARIO

Fisher	90
Scherer (enskribita)	1

KASISTO

Pharo (solá kandidato)	88
------------------------------	----

ESTRARANOJ

Richardson	81
Helmuth	79
Orloff	79
Pollock	77
Goldman	76
Ackerman	74
Stewart	41

ADRESOJ de POSTENULOJ de ELNA

Prezidanto: Armin F. Doneis, Sr.

Box 105, Pharr, Texas.

Vicprezidanto: Dirk Brink,

P.O. Box 4367, San Diego 4, California.

Sekretario: Conrad Fisher,

RFD 1, Meadville, Pennsylvania.

Kasisto: Edw. W. Pharo, Jr.,

220 County Line Rd., Somerton 16, Pa.

ESTRARANOJ

David B. Richardson,

3412 North Mullen, Tacoma 7, Wash.

Miss Roan U. Orloff,

31 Nahanton St., Newton Centre 59, Mass.

Elwyn C. Pollock,

2222 Crest Drive, El Cajon, Calif.

Thomas A. Goldman,

719 Chapala Dr., Pacific Palisades, Calif.

Forrest J. Ackerman

915 S. Sherbourne Dr., Los Angeles, Calif.

Howard G. Borden,

110 So. Overbrook Ave., Trenton 8, N. J.

Adrian Hughes,

476 So. Bailey Ave., Hillsboro, Oregon.

NIA PREZIDANTO

SALUTAS

MI SALUTAS VIN OFICIALE, kaj dankas vin pro via konfido je mi. Neniel mi avidis altan postenon, sed nun ke vi ĝin altrudis, mi akceptas la respondecon kaj provos taŭge plenumi la taskojn de prezidanto. Humile, laŭ mia kapablo mi faros ĉion eblan por akceli Esperanton en Norda Ameriko, kaj mi petas vian helpon per konsilo, pacienca toleremo kaj aktiva kunlaboro. Per tio mi eble povos alproksimiĝi al la alta grado de sagaca, taktoplena konduto, kaj konduko de la Ligaj aferoj, kiujn sukcesis atingi brile kaj amike nia Prezidinto Lewine. Al li ni ŝuldas tri progresplenajn jarojn dum kiuj nia Ligo prosperis. Al li kaj liaj helpantoj ni ŝuldas brile sukcesintan 5an Kongreson de ELNA en New York. Kaj al li mi persone ŝuldas modelon por estonta konduto kaj agado demokrateca kaj harmonia.

Kun rigardo al estontaj taskoj, ni konsciu pri la ĉefpunktoj de nia laboro:

1. Intensigi kunlaboron inter U.N. kaj Esperantistoj, kunlaborekun UEA.
2. Akceli akcepton de Esperanto flanke de Lernejoj kaj Junular-movadoj.
3. Ekspluati plene feston de Jubilea Jaro 1959 kaj prepari jam nun.
4. "Ni fosu nian sulkon!" en hejma tereno inter familianoj, amikoj kaj gekonatoj.

Antaŭen al la taskoj!

ARMIN DONEIS

Prezidanto Doneis kaj la ceteraj niaj gvidantoj bezonas VIAN helpon, viajn konsilon kaj aktivan kunlaboradon. Sendu al ili viajn sugestojn kaj diru kion VI povas kaj volas fari por sukcesigi Esperanton en Norda Ameriko. Venka armeo ne povas konsisti nur el generaloj! redaktoro

Aventuroj por kaj per Esperanto

de Ralph Bonesper

AL NENIU LA MANKO de unu internacia lingvo estas pli sentebla ol al maristo. Tamen, la nombro de Esperanton sciantaj maristoj estas relative tre malgranda. Maristo kutime scias pli aŭ malpli, almenaŭ bagatele, kelkajn lingvojn. Tamen lingvobaroj ĝenas lin en ĉiu eksterlanda haveno. Mi persone spertis tion dum mia kvarjara marveturado inter Eŭropo, Ameriko kaj Afriko.

Antaŭ ol mi enŝipiĝis, mi opiniis ke la marista medio estas la plej ideala kampo por propagandi Esperanton. Tamen poste la sperto instruis al mi la fakton, ke maristoj ĝenerale ne estas idealistoj, sed unue kaj prefere "realistoj." Sendube ili rekonas la necesecon de unu internacia lingvo, sed por ili la bezono estas *tuja*, ĝenerale kaj praktike uzebla jam *nun*, eĉ se ĝi devus esti iu nacia lingvo. Tiutempe mi tre malofte havis favoran oportunon por pruvi ke foje-foje, jam nun ankaŭ por maristo Esperanto estas praktike utila. En tia situacio mia penado por Esperanto rezultigis preskaŭ ĉiam nur ignoron, mokadon kaj eĉ kompaton. Precipe la oficeiroj, kiuj scias sufiĉe bone 2 aŭ tri lingvojn, kondamnis Esperanton kiel jam mortintan lingvon. Ilia favorata pasio estis sarkasme voki al mi anglalingve, kiam mi penadis interkompreniĝi kun indiĝenoj en Afriko: "Parolu al ili en Esperanto. Ni vidu ĉu ili komprenos vin." Tamen ne malofte okazis, ke ili enviis min pro mia kontaktiĝo kun esperantistoj en diversaj havenoj, dum la aliaj ŝipanoj, eĉ poliglotoj, sentis sin tute fremdaj ĉie. La tuta anaro de mia ŝipo "Balaton" nombris nur 35, devenintaj el ne malpli ol 10 diversaj landoj. Tiel mi travivis multajn aventurojn per kaj por Esperanto. Jen kelkaj el ili:

Post 40-tago veturo el Argentino nia ŝipo alvenis en la "liliputan" havenon de Aarhus en Svedio. Nia ŝipo vere okupis la tutan havenon. Krom la apudkajan gren-ejon ni vidis tie nur arbarojn kaj unu aŭ

du dometojn en la horizonto. La ŝipestro vokis min kaj diris anglalingve: "Nu, mi estas certa ke vi trovos neniujn esperantistojn ĉirkaŭ tiuj arbaroj." Mi mem ekdubis pri tio. Sed intertempe Goteborga, samideano informis pri mia ŝipo esperantiston, kiu somerumis en la apudbarbara feriejo. Jam la saman tagon mi kontaktiĝis kun li kaj kun du aliaj esperantistoj tie feriantaj. Estis dimanĉo, kaj la svedaj gesamideanoj esprimis la deziron viziti la ŝipon. Mi tuj demandis la ŝipestron pri permeso kaj li sen hezito konsentis, elmontrante surprizegon, ke eĉ en tiu arbarego mi trovis esperantistojn.

Sed multe pli granda estis la surprizego de la ŝipestro kaj de la ŝipanaro kiam, anstataŭ du gesamideanoj, invadis nian ŝipon 26 "Esperanto-geamikoj" kaj la plejmulto el ili estis junulinoj, kies ĉarmo kvazaŭ sorĉis ĉiujn ŝipanojn. (Nun mi rimarkigu, ke dum la 40-taga veturado sur la oceano ni vidis neniun virinon, nek eĉ malĉarman.) Kompreneble tiam Esperanto tre favore impresis ĉiujn ŝipanojn, Kvankam la junulinoj babiladis nur svede, por la ŝipanoj ili aperis kiel "Esperanto-knabinoj." Nun mi konfesu tion, ke nur du personoj el la tuta vizitataro sciis Esperanton, kiuj invitis 24 geamikojn neesperantistajn viziti la ŝipon. Tio vere estis bonega ideo, ĉar tiuj nur svede babilantaj ĉarmulinoj faris bonegan impreson pri la "praktita uzebleco" de Esperanto.

(dua Aventuro de Bonesper ĉe paĝo 13)

Esperanto Vagabonds in Europe

Third in a series of articles on the wanderings of the Doneis family (Peggy, 14, Pancho, 17, Peter, 8, and their parents, Mary and Armin—Esperantists all).

THE Trossacks and Loch Catherine, the castles of Edinburgh, Stirling Castle, Bobby Burns' birthplace in Ayre, just a stone's throw from Brigo'Doon, the shipyards of Glasgow, and the rugged hills of Scotland will long remain in our memories.

Quickly the "Flying Dutchman" of the Royal Airlines whisked us comfortably back to New York, via KLM, and from there it didn't take us long to reach the sunny banks of the Rio Grande. It was good to be home again!

With all the wonderful sights in ten thousand miles of continental travel through fourteen countries, over twenty-four major mountain passes and innumerable tunnels and serpentine roads, with all the many experiences that thrilled us, with the new places visited, with the intriguing craftsmen's workshops where we snooped about to watch the handiwork, with all the quaint and humble birthplaces of famous leaders in music, literature, religion and history, with all the grand scenery and impressive monuments to man's vanity, the castles and palaces, in spite of many high points of our travels, there will always be one facet of our trip which will overshadow all other impressions, pleasures and joys of our journey. That one most enjoyable and impressive experience was the warm personal friendships of many different kinds and nationalities of European people.

In at least forty-one private homes in fourteen countries we were invited as honored guests by the natives of those lands to share their meals; to see their homes; to enjoy their gardens; to meet

their families and friends; yes, even to sleep in their beds; to go to their schools and speak with their fellow students and teachers; and worship with them on Sundays. It is these personal contacts that will forever make our trip a memorable one.

This intimate sharing of common interests and concerns, the friendly unassuming hospitality and helpfulness, the trusting candor and free exchange of ideas, longings, aspirations and joys was only possible to us because we had an effective cure for the language problem. Instead of trying to cope with fourteen languages, or expecting our friends to speak to us in halting, mutilated English (or British!), we succeeded in surmounting the language barriers by speaking the neutral, simple expressive and easy international language.

In the years hence, when we think of Europe and our visit there, we'll remember not just Napoleon's Tomb, or the Eiffel Tower, the castles on the Rhine, Cologne Cathedral, the Coliseum of Rome or the Bridge of Sighs in Venice. No, instead there will rise up in our memories the faces of dear friends and gentle people who live and love and work in Innsbruck or Vienna, in Cologne or Paris, in Copenhagen or Rome, in Edinburgh or Salzburg, in Amsterdam or Zurich, in Munich or Venice. Real, live, honest-to-goodness friends, not just individuals, but whole families with whom we got well acquainted through the use of Esperanto. No futile gestures or frustrating mute smiles across the language barriers. These friends have made this trip unforgettable and we'll never be the same for having met them over there.



Fine de la pasinta jarcento, en la jaro 1896, elŝipiĝis en la meksika haveno Veracruz la kondukinto de Esperanto en Meksikion, franca samideano Inĝeniero Anselmo Morin kune kun sia familio; sia edzino kaj du filinoj ankaŭ esperantistinoj. Li venis por labori kiel Direktoro de la teksfabriko Sankta Rozo, lokita en la urbo samnoma, Sankta Roso Nekoŝtla, kotonuzina regiono en Orizaba, Ŝtato de Veracruz. Tial li konatiĝis kun Doktoro Ambrosio Vargas Valencia, kiu gvidis la kuracadservon en la fabrikoj de tiu regiono. Iliaj respektivaj laboroj interkonatigis ilin, kaj baldaŭ ili interkompreniĝis por labori favore al la esperanta movado.

Tuj kiam D-ro Vargas lernis la novan lingvon kaj ili varbis aliajn geamikojn, ili pretigis ĉion por fondi la unuan esperantan rondon nomitan "Societo por Propagandi Esperanton" en la historia kunteveno en Nekoŝtla la 5an de decembro, 1903, kun 26 ĉeestantoj el tiu urbo kaj aliaj vilaĝoj en la regiono. La unua elektita estraro estis jena:

Honora Prezidanto, D-ro L. L. Zamenhof; Prezidanto, Inĝ. Anselmo Morin; Vicprezidanto, S-ro Enrique Lamicq (Urbestro); Sekretario, D-ro Ambrosio Vargas Valencia; Kasisto, S-ro José R. Avalos (oficisto); Voĉdonantoj, Pastro Fernando Blanco (Paroĥestro) kaj S-ro Eduardo Amador Saldaña (Sekretario de la Juĝejo.)

La urbeto Nekoŝtla estis la sidejo de la

Societo. Tie ili eldonis en januaro, 1904, la organon de la Societo, "*Meksika Lumturo*," en kies unua numero aperis la statutoj kaj listo de societanoj.

En la sama jaro, D-ro Vargas faris la unuan paroladon pri Esperanto en la ŝtata mezlernejo de la urbo Orizaba, kie li estis profesoro de biologio. Tiu unua afero favora al Esperanto estis sub la protektado de D-ro Nikalao Diaz, Direktoro de la lernejo. La parolado plensukcesis, tial estis malfermita esperanta kurso en tiu lernejo. Tiu ĉi kurso estis sub la gvidado de D-ro Ambrosio Vargas Valencia, Sekretario de la unua Meksika Esperanto-Societo. En aparta kurso en la sama urbo, D-ro Vargas instruis Esperanton al la samideanoj Valeriano Romero, Ernesto Guerra, Jozefo Arroyo kaj aliaj.

La movado kreskis iom post iom, tiel ili preparis kampanjon por penetri en la ĉefurbon kaj la 26an de majo, 1905, D-ro Vargas organizis la duan prelegon pri Esperanto ĉe la kuracista societo "Petro Escobedo."

Advokato de la ĉefurbo, S-ro Ramon Manterola, aliĝis al la movado en januaro, 1905 kaj tuj estis eminenta esperantisto, kiu multe helpis divastigi la lingvon tra la tuta lando. Li donis paroladon ĉe la scienca societo "Antono Alzate" la 30an de majo, 1905, kelkajn tagojn post la parolado de D-ro Vargas. La tiamaj samideanoj fervore laboris per la gazetaro, paroladoj, leteroj kaj diversmaniere, ĝis formi grupojn en diversaj regionoj de la lando; Guanahuato, Hidalgo, Puebla, Miĉoakan, k.a. La ĉefurbanaj esperantistoj intensive laboris tiel, ke la okpaĝa *Meksika Lumturo* finis sian komencan mision, kaj anstataŭis ĝin la deksespaĝa revuo *Verda Stelo* en januaro, 1905.

José Serrano
(*Samideano Serrano daŭrigos la rakonton en venontaj numeroj de la Revuo.*)

Mesaĝo de l' Prezidinto

DUM LA LASTAJ TRI JAROJ la Esperanto-Movado en Nord-Ameriko pasis tra tagoj malfacilaj, sed nun oni povas antaŭvidi la estonton kun plena fido.

La klopodoj de nia membraro falas logike en plurajn kategoriojn. En la sfero de la propagando, la tasko plej urĝa estis plibonigi nian *Revuon* kaj pligrandigi la nombron da legantoj. Ambaŭ klopodoj sukcesis tre bele. Ni rajtas fieri pri nia *Revuo* kaj ni ŝuldas al la samideanoj kies sindediĉo kaj sinoferemo ebligis ĝian eldonon, ĉiam pli ampleksan kaj pli interesan, nian dankemon sinceran. La dissendo de ekzempleroj de l' *Revuo* al bibliotekoj urbaj kaj universitataj tra la lando multe helpis diskonigi Esperanton kaj nian Ligon. Alia tasko propaganda multvalora estas la informservo kiu metas sur la laborotablojn de ĵurnalistoj tra la lando sciigojn pri la uzindeco de Esperanto kaj pri ĝiaj venkoj tra la mondo.

Alia kategorio en kiu la tri jaroj montras bildon de progreso estas tiu de l' varbado de novaj membroj. Gravajn paŝojn antaŭen oni povas noti: Konstanta progreso en la aniĝo al ELNA de personoj kiuj lernas Esperanton je la unua fojo kaj, simile, reaniĝo al la movado de samideanoj kiuj ĝin estis forlasintaj aŭ pro apatio aŭ pro malplaĉo pri certaj grupoj aŭ individuoj. La sukceso de l' kampanjo por pligrandigi la membraron pruvas ke ELNA scias gajni la aprobon de la plejmulto de la veraj Esperantistoj nepartiemaj en Nord-Ameriko.

Sed akcepti la celojn de l' movado ne sufiĉas por fari bonan Esperantiston. Nepre necesas uzi la lingvon kaj ĉiam plibonigi la kapablon sin esprimi per ĝi. Tio ĉi postulas de l' Esperantisto praktikon konstantan, kaj de l' movado, la starigon de kursoj, aŭ lokaj, aŭ per korespondado, kaj de libroservo kiu permesas al ĉiu Esperantisto la eblon aĉeti taŭgajn librojn kaj

aboni la plej bonajn revuojn. Dank' al la klopodoj de multaj samideanoj — mi povas nomi ĉi tie nur du: s-anojn Dormont kaj Turner — la nivelo de l' lingvokapablo de Esperantistoj en Nord-Ameriko tre evidenta pliboniĝas.

Dum tiuj ĉi tri jaroj niaj kongresoj estis pruvoj de l' vivokapablo de nia Ligo. Dum nia lasta kongreso en Nov-Jorko, kie akceptis oficiale la kongresanojn la Direktoro pri Publika Informado de UNO, ni fiere establis nian rajton esti konsiderata kiel organizaĵo respektinda en la mondo de organizaĵoj internaciemaj.

Pri la estonto mi estas optimisma. Ni rajtas nin gratuli pri nia nova Prezidanto, S-ano Doneis. Li estas tre kapabla estri nian Ligon: li flue kaj bele parolas Esperanton, kiun li ĝisfunde regas; li estas tre alte estimata ne nur en Nord-Ameriko, sed ankaŭ en Eŭropo; li komprenas la problemon de Esperanto-organizaĵo en Usono per longa sperto, kaj, fine, li ne estas "Esperantisto unuopa", sed, male, ĉefo de familio cent pro cent Esperantista!

La taskoj antaŭ ni estas, certe, malfacilaj, sed ne nevenkeblaj. Ni povos akiri, mi opinias, akcepton favoran — eĉ se ne oficialan — ĉe UNO; kaj se ni sukcesos tie akiri bonvolon kaj komprenemon, tio multe plifaciligos la venkon de nia ideo ĉe instancoj gravaj en Nord-Ameriko. Ni povos daŭrigi nian vojon ĝisnunan kun sukceso certa se ĉiu oferos al nia nova Prezidanto saman kunlaboron fidelan kaj senhezitan kian ĉiuj oferis al mi dum la lastaj tri jaroj kaj pro tio mi volas, finvorte, esprimi al vi ĉiuj, karaj gesamideanoj, mian dankemon sinceran kaj tutkoran.

John L. Lewine, Prezidinto

Local Addresses

Centro por Kanadaj Esperantistoj: Box 52, Terminal A, Toronto, Kanado.

Esperanto-Klubo de Los Angeles: 1237 N. Alexandria Ave., Los Angeles 29, Calif.

Washington Esperanto Club: Apt. 101, 2829 Gainesville St., S.E., Wash. 20, D.C.

Esperanto-Societo de San Diego: P.O. Box 4367, San Diego 4, California.

Seattle Esperanto Society: 3231 West 62nd St., Seattle 7, Wash.

Esperanto in Buffalo: P.O. Box 222, Niagara Sta., Buffalo 1, N.Y.

Esperanto Coterie of Texas: P.O. Box 805, Houston 1, Texas.

Esperanto Club of Santa Monica: 855 Franklin St., Santa Monica, Calif.

Esperanto Society of Greater New York: 767 United Nations Plaza, New York 1, NY.

Esperanto Society of San Francisco: 346 Staples Ave., San Francisco 12, Calif.

Sacramento Esperanto Club, 450 45th St., Sacramento 19, California.

Esperanto Society of Long Beach: R. C. Betteridge, Pres., 5409 Graywood Ave.,
Lakewood, Cal.

George E. Wagner, 403 E. North St., Tampa 4, Florida.

H. K. Ver Ploeg, 1908 East 8th Avenue, Spokane 32, Wash.

Jarvis E. Bush, 3700 North 75th St., Milwaukee 16, Wisconsin.

Christie W. Roberts, Rose Valley, Saskatchewan, Kanado.

F-ino Ethel Kelley, Birch-haven, RFD 1, Cambridge Springs, Penna.

Mr. and Mrs. Wesley Stevens, 211 North Dithridge Ave., Pittsburgh 13, Penna.

(a blind couple, correspond by tape recordings. Want local contacts for study group.)

BONVOLU SKRIBI

Lidija Ilieva, str. Asen Ia, N. 55, Sofio C, Bulgario. Finis pentroartan Akademion en Sofio, okupas sin per pentrado. 26-jara, dez. kor. nur pri belartoj: pentrado, grafiko, skulptado, ktp.

Aleksandro Petrunov, sama adreso. 29-jara, finstudas literaturon en Sofia Universitato, samtempe laboras en libroeldona entrepreno. Dez. kor. nur pri literaturo.

S-ro Zdzislaw Rabecki, Strato 1 Majo 73/7, Lodz, Pollando. Juna inĝeniero mekanika, edzo, du infanojn. Dez. kor. kun usonanoj.

B. Krawczewski; Mikstat, Woj. Pozn., Pollando. Poŝtmarkojn.

Gunnar Skogh; Drottninggatan 34 B, Linköping, Svedlando. Kun usonanoj, prefere filatelistoj.

-Juozas Kazlauskas, Panevezis, Basanaviciaus 60/64, Litova SSR.

ELNA-ANOJ! DONACABONU!

Membroj de ELNA rajtas donacaboni la *Revuon* por bibliotekoj publikaj, universitataj aŭ lernejoj, aŭ por alilandaj geamikoj je favora prezo de 30¢ por jaro. (Ordinara abono kostas \$1.75 por jaro.)

Pledas la redaktanto por si, kaj "kulpa".

Li kulpas pri difektoj en la bulteno, pri preseraroj, kiujn preterlasas lia atento, pri artikoloj kiuj ne plaĉas al ĉiuj. Sed ne pafu al la pianisto, li faras sian eblon.

el *SAT-Amikaro*

Trans la Lingvaj Barilojn

Francis kaj Bonnie Helmuth, el San Diego, komencis lerni Esperanton en Aprilo, 1955. Post jaro kaj duono ili entreprenis unujaran vojaĝon tra Eŭropo, kaj raportas al ni.

WIESBADENO, GERMANUJO, 16 NOVEMBRO, 1956 — En ĉi tiu urbo ekzistas bona esperanta kurso en la popollernejo vespere, kaj S-ro Schonrich estas la instruisto. Lia profesio estis instruado, do kompreneble li estas lerta instruisto. Estas dek studentoj en la klaso, kiu estas por progresantoj. Bonnie kaj mi ĉeestis la klason kaj, kvankam la instruisto kelkfoje uzis la germanan lingvon, plejparte li uzis Esperanton kaj ni vere povis ĝui la klason kaj lernis pri kelkaj gramatikaj aferoj.

Aperis en Usono antaŭ unu jaro filmon, "Special Delivery," pri eŭropaj landoj, kaj en tiu filmo oni uzis Esperanton por la lingvo de lando kiun oni ne volis identigi. La filmo estis farita en Wiesbadeno antaŭ du jaroj. S-ro Schonrich estis teknika konsilisto por la esperantaj partoj, kaj li ricevis kelkcent markojn por sia helpo. Li diris al ni ke li tradukis multe pli da esperantaj vortoj ol oni uzis en la filmo sed, evidente, oni fortranĉis kelkajn partojn. Jen interesaĵo por niaj gesamideanoj en San Diego, Kalifornio, ĉar kiam "Special Delivery" aperis en nia urbo la tuta grupo iris al la kinejo por aŭdi la esperantaj vortojn. Poste ni skribis gratulleteron al la filmkompanio pri la afero.

Sabaton ni havis okazon por renkonti du malnovajn, fervorajn geesperantistojn, la gesinjoroj Bertram Potts el Wellington, nov-Zelando. Li estas eksĵurnalisto kaj malnova esperantisto, kaj dum sabata vespero li paroladis al speciala kunveno de la esperanta klubo en Wiesbadeno pri sia hejmo kaj la geesperantistoj tie. Li estas lerta, interesa paroladisto, kaj mi estas certa ke la tuta grupo ĝuis lian paro-

ladon. Ĉiuj opiniis ke la vespero forflugis tro rapide.

La gesinjoroj Potts jam estis en Eŭropo dum ses monatoj, kaj ili vojaĝis tra Aŭstrio, Italujo, Jugoslavio, kaj Germanujo por propagandi Esperanton kaj fari paroladojn. S-ro Potts diris al mi ke dum la sesmonata vojaĝo en Eŭropo li uzis nur Esperanton, eĉ inter si kaj sia edzino; kaj ke unu aŭ du foje, kiam li havis okazon por skribi aŭ paroli angle, li devis serĉi la vortojn, do dum lia restado en Wiesbadeno li neniam uzis la anglan lingvon.

Post kelkaj monatoj ili intencas veturi, ŝipe, al Nov-Jorko, kaj tiam veturos trans la landon al Kalifornio. Ili certe haltos en San Diego por fari paroladon kaj renkonti la membrojn de nia grupo tie. Bedaŭrinde, ili povis resti en Wiesbadeno nur dum unu tago kaj dimance devis foriri al Mainzo por fari alian paroladon tie, kaj ni devis adiaŭi al Gesinjoroj Potts kun la espero ke ni revidos ilin aŭ en Hispanujo post kelkaj monatoj aŭ eble en Usono dum la venonta jaro.

S-ino Opperman, esperantistino en Wiesbadeno, invitis nin al sia domo por vidi alian parton de la urbo kaj por paroli kune. Ni promenis tra belaj arbaroj kiuj estas ĉirkaŭ la urbo, kaj ni vidis en la ĉirkaŭaĵoj de la urbo multajn apartajn domojn. Kutime, en Eŭropo la urboj estas konstruitaj same kiel urboj en Usono, kun grandaj apartamentaroj kaj loĝejoj apud la centra parto de la urbo, kaj en la ĉirkaŭaĵoj oni konstruis apartajn domojn kaj malgrandajn apartamentarojn.

Jaŭdon ni foriris el la bela banurbo, kaj veturis vagonare al Parizo.

Bonvolu Skribi

La *Revuo* presas senpage (sed foje mallongigas) korespondpetojn el aliaj landoj. Tiuj anoncoj aperas nur se, kaj kiam, konvenas al la redakcio (ĝis nun ni senprokraste presis ĉiujn, kies adresojn ni povis legi), kaj ili temu nur pri korespondado *en Esperanto*. Por certigi nepran aperon, oni pagu \$1 ĝis 4 paĝvastaj linioj. Se resendadreso ne estas legebla, ĝi estas nek presebla, nek presinda, do ne presota. SKRIBU KLARE!

MALLONGIGOJ: Dez., deziras; kor., korespondi; pk., poŝtkarto; bk., bildkarto; pm., poŝtmarko; gaz., gazeto; il., ilustrita; interŝ., interŝanĝi.

C. Daglio, Litta Parodi, Alessandria, Italujo. Del. de U.E.A. dez. kor. pri multegaj temoj, nur Interstene en lingvoj Esperanto, Angla, Franca, Itala; ricevas ankaŭ hispane, portugale, germane.
(pagita anonco)

Imoriya Masahisa, Musen Denki Gakko, Yatatomda-ĉo, Higaŝisumiyōŝi-ku, Osaka, Japanio. 26-jara, fraŭlo, komencanto, dez. kor., interŝ. belartaĵojn kaj diversajojn.

D-ro Ladislav Kempny, Leninova 70, Opava-Silezio, Ĉ.S.R. Zoologo.

GRAVAJ MEMORIGOJ

Ĉiujn pagojn al la Ligo aŭ al la *Revuo* oni sendu al la Kasisto. Adreso:

Esperanto, Somerton, Pennsylvania.

Ĉiuj ĉekoj kaj poŝtĉekoj estu pageblaj al:

Esperanto League for North America, Inc.

Se la zonnumero mankas en via adreso sur la koverto, sendu la korektan adreson al: Nordamerika Esperanto-Revuo,

2116 No. 35 St., Seattle 3, Wash.

Ĉiujn informpetojn pri Esperanto en Norda Ameriko oni sendu al la Sekretario: Conrad Fisher, RFD 1, Meadville, Penna.

LA REVUO PETAS HELPON!

Ĉar la redaktoro-kompostisto-presisto nun devas uzi pli da tempo ol antaŭe por siaj personaj aferoj, necesas dungi iom el la kompostado antaŭe farita de li. Por daŭrigi la nunan kvaliton de via gazeto kaj tamen ebligu ke la redaktoro vivu kvazaŭ li estus civilizita homo, necesos aldone enspezi proks. \$50 por ĉiu numero.

KIUJ VOLAS FARI DONACOJN?

INFORMOJ DE UEA

UNESCO kaj UEA subskribis kontrakton pri eldonado (koste al la unua!) de afiŝoj pri UNESCO *en Esperanto*. Oni jam presis la tri unuajn seriojn:

1. Fotofolioj, ĉiu kun 6-7 fotografaĵoj, 62x52 cm., sub titolo "Programo Por Pli Bona Vivo";

2. Fotofolioj (samaj kiel 1) pri la porinfana laboro de UNESCO, "Civitanoj de la Morgaŭo";

3. 16 diversaj afiŝoj en serio, 35x51 cm., "Scio Ne Konas Landlimojn".

Presiĝos entute 3000 afiŝoj, po 250 ekzempleroj de ĉiu desegnaĵo. Helpu ke ĉiuj afiŝoj montriĝu en publikaj lokoj.

Kvankam UNESCO pagas preskostojn, oni devos sendi al UEA por *unu tuta eldono* de la 3 serioj 4 stelojn (28¢) por sendkosto. Mendu ĉe: UEA, 7 Eendrachtsweg, Rotterdam C, Nederlando.

UEA nun akceptas duonjarajn kotizojn de tiuj malnovaj membroj, kiuj ne realiĝis deposedi ioma tempo, por ilin rekonigi al la nuna stato de UEA kaj ĝiaj gazeto kaj laboroj.

New York, City of Wonders

(See what you missed by not being with us in New York!)

WITH A PAIR OF COMFORTABLE WALKING SHOES, and some physical endurance, a visitor to New York can cover a lot of territory and see a great deal of this complex and fascinating city. With the same pair of comfortable shoes, and a knowledge of shopping values, the visitor can take home some of the finest fashions, rarities and oddities that have ever been created.

To get a comprehensive look at New York, we suggest that the visitor take a guided bus tour of the city. Later he can return to those places that interested him for a more leisurely visit. The Gray Line, located in the Greyhound Bus Terminal, 245 West Fiftieth Street, is one of the best. Most first-time visitors want to see the Empire State Building, the Statue of Liberty, Rockefeller Plaza, St. Patrick's Cathedral and Central Park. These certainly should not be missed, but there are other points of interest, a few of which are listed below. A good help in getting around New York is a street guide and map of the city, purchasable at any of the larger newsstands. The map will indicate points of interest and show routes to them. An outstanding trip, most of our towners feel, is the ferry trip from South Ferry across the harbor to Staten Island. For the cost of five cents each way, a forty-minute 'cruise' on New York Bay offers a cooling ride and a chance to see the famous New York skyline. After debarking at South Ferry after the round trip, we suggest a visit to Wall Street, the great financial center of New York, and a visit to the Sub Treasury Building. In this area are Trinity Church, The Federal Reserve Bank of New York, which has guided tours, and the New York Stock Exchange. North is New York's City Hall and Brooklyn Bridge. Around Foley Square are the Tombs prison, U.S. Court House, State office Building, the Supreme Court Building and others.

A walk through New York's lower East side, with its crowded streets and tenements is quite colorful. Many of New York's famous people came from this section. New York University at Washington Square is worth a visit as is old Merchant's House at 29 East Fourth Street. Chinatown, located at Mott, Pell and Doyer Streets, is intriguing to the visitor. Going on uptown, one should not miss the great Bellevue Medical Center, a city in itself with over three thousand beds. The Main Post office at Thirty-Third Street and Eighth Avenue is a busy place. For quick reference we will list places to visit according to category.

Churches: St. Patrick's Cathedral, Mott and Prince St., oldest Catholic cemetery, old crypts. Grace Church, Broadway and Tenth, historical memorials, guided tours at Sunday noon. Little Church Around the Corner, Fifth Avenue and twenty-ninth St., set in the garden, beautiful stained glass windows. Marble Collegiate Church, Fifth Ave and Twenty-Ninth St. St. Patrick's Cathedral, Fifth Ave and Fiftieth St., architecturally superb. Central Synagogue, Lexington Ave and Fifty-fifth St., oldest synagogue in continued use. The Spanish Portuguese Synagogue, Central Park West and 70th St., built in 1654.

Points of Interest: The Flatiron Building, Broadway and Twenty-third St., city's first skyscraper. New Building, 220 East Forty-second St., educational exhibits in lobby, guided tours. New York Public

NEW YORK (from preceding page)

Library, Fifth Avenue and Forty-second St., six million books, millions of pictures, Esperanto books, stamp collections. Madison Square Garden, Fiftieth St. and Eighth Ave., indoor sports arena seats 20,000. Carnegie Hall, Seventh Ave and Fifty-seventh St., ballet, lectures, concerts, etc., United Nations (Congress attraction). Gracie Mansion, Eighty-eighth St. at East River Drive, home of Mayor of New York, guided tours. Polo Grounds, Harlem River Parkway and 157th St., baseball home grounds of the New York Giants. Columbia University, Broadway and 114th St., one of the oldest and largest educational institutions. Grant's tomb, Riverside Drive and 123rd St., massive granite memorial.

These are but a few of the sights that New York has to offer, and space does not permit us to even touch on the other boroughs and their attractions. We again refer you to the city map for other and special interests.

Shopping Wise: There is Macy's, Thirty-fourth St. and Sixth Ave., the world's largest store. Fifth Avenue from thirty-fourth Street to Fifty-seventh Street is lined on both sides with shops offering everything conceivable. It is interesting to note that the further uptown one goes the higher the fashions and the higher the prices. Thus, Saks at Thirty-fourth St. and Herald Square is a modest priced store, Saks Fifth Avenue at Fiftieth St. and Fifth Ave. is not.

The Visitors' Bureau: For a last word, there is a visitors' bureau at 500 Park Ave. staffed with amiable and knowledgeable young ladies who are there to help you with your vacationing or sightseeing needs. So, have a good time in this wonderful city of ours!

(*Too bad you didn't see it with us!*—ed.)

AVENTUROJ DE BONESPER II

Nia ŝipo troviĝis nur 5 horojn en Alĝero por preni provizaĵon, karbon. Mi jam kelkfoje estis vizitinta tiun afrikan urbon, kaj ŝipkadeto—kiu neniam antaŭe estis en Alĝero—proponis al mi kune vagadi 2-3 horojn en tiu urbo. Li estis la plej fanatika kontraŭulo al Esperanto, kaptante ĉiun oportunon por moki min pro Esperanto. Li adoregis la francan lingvon, lerninte ĝin dum pli ol ok jaroj, kaj li fantaziadis ke la franca lingvo devos esti la universala lingvo por la tuta mondo. Post promenado en la urbo, ni estis reirantaj al nia ŝipo kiam li diris, ke li nepre devas aĉeti alumetojn. "Jen estas butikoj," mi diris al li. "Eniru kaj aĉetu." Sed li insistis ke prefere mi aĉetu la alumetojn, ĉar li tre hontas, se oni ridas pri lia franca elparolado. Subite ideo fulmis en mian kapon. "Mi konsentas," mi diris al li. "Sed ankaŭ vi venas kun mi en la butikon por aŭdi, ke mi uzos nur Esperanton." Jes, tiel okazis. Ni ambaŭ eniris la butikon kaj mi diris al la butikistino, "Donu al mi du skatolojn da alumetoj." Sen hezito ŝi donis al mi la alumetojn, je la konsterniĝo de mia kunulo. Ekstere mi diris al li anglalingve, "Al infero via franca lingvo. Studinte ĝin dum tiom da jaroj, vi ne kuraĝas peti alumetojn. Mi preferas resti kun Esperanto." Sed nun mi devas konfesi, ke tiu butikistino supozeble ne sciis eĉ tion, kio Esperanto estas, tamen ŝi bone komprenis mian Esperanton, ĉar esceptante la vorton "skatolo" la tuta frazo dirita tre, tre similas al la sama frazo en la franca lingvo. Jam antaŭ ol ni eniris la butikon mi rimarkis, ke la nomo de la butikisto indikas italan devenon, sekve oni komprenis la vorton "skatolo"; *itale*, "scatola." Mia kunulo neniam plu mokis Esperanton.

KANTU! RIDU! ĜOJE ANTAŬEN!

TAPE RECORDERS, ATTENTION!

Important Notice from the Secretary

I have these magnetic tape recordings sent from Europe. I want to loan them to owners of recorders to hear and send on to others on a list I'm compiling.

1. Radio Roma, Swiss Radio; 3 inch tape.
2. Readings by members of "Bona Stelo" group in Romans, France; 5 inch.
3. Readings and talks by members of Uppsala Esperanto Club, the *first* such group in the world; 4 inch.

also—my own recordings:

4. "Pensilvanio Havas Ĉion"; 3 inch.
5. Esperanto pronunciation; 3 inch.
6. Paroloj de Zamenhof; 7 inch.

All I ask is that you send postage: 3 — 5 inch, 4¢; 7 inch, 8¢. I especially want local groups to hear these and future similar recordings.

I want addresses of all persons and groups who will record their voices in Esperanto, to be sent to other countries. Some foreign Esperantists have never heard an American Esperantist; many in our country have never heard a foreign Esperantist. I shall send a tape to each address. You listen to the voices already on the tape, then add yours after them. The tape will come back to me when it has been filled, then I'll send it to Europe.

Conrad Fisher, RFD 1, Meadville, Pennsylvania.

NEW TAPE RECORDING SERVICE INAUGURATED BY UEA

UEA has just appointed Rudiger Eichholz, in Oakville, Ontario, Canada, as director of its new "Magnetofona Servo" or tape recording service. Although full details have not yet been sent out, I hope all readers owning tape recorders will write to me telling what kind of machine, speeds, single or double track.

It is intended to collect speeches at the congresses, lectures, etc., in Esperanto, to be loaned or sold. This will give every group and individual a chance to listen to and imitate correct pronunciation of the international language.

Postage, 4th class, on tapes in the U. S., Canada and Mexico is 4¢ first pound, 1¢ each additional pound; to other countries, 8¢ first pound, 4¢ each additional pound. It is best to glue the form 2976, green customs sticker, on tapes to all countries, because it is compulsory for some of them.

Write directly, if you prefer, to: Mr. Rudiger Eichholz, UEA-Magnetofona Servo, Esperanto Press, Oakville, Ontario, Canada.

For books in or about Esperanto
write to

Esperanto League Book Service

Middleton, Wis.

Ask for free book list

Introduction to
ESPERANTO
THE UNIVERSAL LANGUAGE
The Third Edition . . . REVISED . . . Price \$2.00
Sent on Five Days FREE Examination!
BOX 792 • PLACERVILLE, CALIF.

NEW YORK, 1957 (*daŭrigo el paĝo 2*)

ajn oni vidis lin, oni ankaŭ vidis kaptitan neesperantiston superŝutatan per informoj kaj argumentoj favoraj al Esperanto. (Por alilandaj legantoj, kiuj ne konas usonan slangon: "Butontruulo" estas homo, kiu kaptas per la refaldo de la jako, tiel ke oni ne povas eskapi inundon de argumentoj.)

Christie Roberts, el Rose Valley, Kanado (vidu la *Revuon*, Nov.-Dec., 1956), kiu lernis Esperanton sen instruisto, instruas klasojn sed neniam havis oportunon por paroli la lingvon, krom kun siaj propraj lernantoj, ĝis kiam li venis al la kongreso. Li petis kaj ricevis permeson alparoli la kongreson dum du minutoj, nur por pruvi al si ke li povas alparoli publikan kunsidon en Esperanto. (Flanke mi diru, ke li faris tre bone.)

Mi esperas ke mi ne embarasas al li, menciante ke li diris al mi, "Mi pli bone komprenas la novjorkanojn kiam ili uzas Esperanton ol kiam ili parolas novjorke anglan." Fakte, eĉ en nia lando elparolado eĉ la *angla* lingvo tiom diferencas, ke Esperanto estas bona interkomprenigilo. Ni eĉiam parolu Esperante inter ni, precipe eĉ kongresoj kaj aliaj esperantistaj kunvenoj. Ni ne forgesu la diron de Kabe: "Precipe la esperantistoj lernu Esperanton"

DECIDO de la ESTRARO

Ke la Ligo pagu al F. R. Carlson por la Julio/Aŭgusta numero \$100.00 pli ol kuinte, pro la fakto ke S-ro Carlson eĉestis al la kongreso en Novjorko.

ASK FOR THIS NEW BOOK
AT YOUR LOCAL LIBRARY
AND BOOKSTORE

"Teach Yourself Esperanto", \$2.75
publishers, English Universities Press

Distributed in USA by
David McKay Company, NYC

"ENGLISH SPOKEN"

En Usono oni ofte aŭdas la aserton ke la angla lingvo jam estas parolata tra la tuta mondo kaj tial oni ne bezonas Esperanton. Nu, oni same povus diri pri aliaj lingvoj. Ĉie en la mondo oni trovas homojn kiuj parolas france, aŭ germane, aŭ hispane, aŭ ĉine, ktp. Sed tio ne signifas ke tiuj lingvoj jam estas tiom universalaj ke oni ne bezonas Esperanton.

Ni konsideru momente la anglan lingvon. Ĉu vere universala? Dum la pasinta vintro konata raportisto por nia plej grava ĵurnalo en Minneapolis (*The Star-Tribune*) kune kun kvar aliaj turistoj, vizitis Italujon. Kvankam inter si ili parolis tri diversajn lingvojn, ili ne povis igi sin komprenataj de la italoj.

Alia ekzemplo: Mia fratino kaj du aliaj instruistinoj vojaĝis en Eŭropo. Unu dimanĉon ili atingis germanan urbeton kaj estante malsataj ili serĉis restoracion, sed ne trovis. Fine ili venis al apoteko en kies fenestro estis la afiŝo "English Spoken" (angla lingvo parolata).

Ili eniris la apotekon, kie post montratablo staris juna fraŭlino. Mia fratino diris al ŝi, "Can you tell us where we can find a restaurant?" La fraŭlino ne komprenis. Mia fratino ree alparolis ŝin. "We are hungry. We want food." La fraŭlino rigardis ŝin per larĝaj okuloj. Unu fojon plu mia fratino provis komprenigi sin. Ŝi malfermis la buŝon, per la fingro montris al la buŝo kaj diris, "Hungry; food."

La vizaĝo de la fraŭlino eklumiĝis. Kun rideto ŝi iris al breto, prenis objekton kaj prezentis ĝin al mia fratino. Ĝi estis dentobroso.

Jes, la angla lingvo estas universale komprenata!

Dr. Lehman Wendell

PORTU LA VERDAN STELON



OR RIMISTOJ

(POETOJ NE LEGU!)

AŬSKULTU, AMIKETOJ

Viro decidis transiri la mondon
 Por vidi, kiel vivas aliuloj.
 "Iros mi ĉien; mi faros la rondon;
 Mi saltos, kiel saltos jen la puloj."
 Trovis la viro la fakton, ke konon
 De lingvoj posedi li devas.
 Laŭte li kriis, "Ho, Dio, disponon
 Je vortoj petege mi revas!"
 Anĝelo tre bela kompleze nun venis:
 "Jen solvo por ĉiu problemo:
 Esperanton ja lernu." Ha! Baldaŭ li benis
 Eskapon el lingva dilemo.
 Ĉie enmonde amikojn li trovas
 Parolantajn Esperanton kun ĝojo.
 "Mondeivitano min nomi mi povas;
 Esperante faciligās la vojo."

de Sardelo

ENIGMO POR ŜAKLUDANTOJ

Kiun poemon enhavas jena ĉevalira problemo?

Kiu verkis tiun ĉi poemon?

La solvon bonvolu sendi al la redaktoro de la *Revuo*.

La nomoj de solvintoj estos publikitaj.

La solvo aperos en venonta numero.

Neniu premio. Nur por amuzi.

Enigmo sendita de A. Holzhaus, Chicago.

gre-	nojn,	son-	l'kam-	kaj	majn	de	do.
ĝa	pa-	ĉa-	de-	la	de	dojn	ho-
kaj	nojn.	nok-	gis	ri-	ro	ka-	jo
ro	for-	ĝar-	ur-	ĉa	tran-	gis	ta-
Ho-	en	li-	to	kam-	bojn	be-	ci-
ge-	dor-	pojn,	kaj	kvi-	Dol-	gi-	ti-
dor-	mojn	gri-	do.	si-	las	kaj	her-
mas	sa-	mo	lu-	lo	En	len-	la

Lernu per Ludo

Lernado de Esperanto ne estu afero de malgaja laborado! Ludu per la lingvo! Verku rimojn, solvu enigmojn, kantu esperantajn kantojn. Bill Harmon proponis, ke la *Revuo* prezentu fivortaron de Esperanto. Eble iuj el vi ŝatus helpi lin en la kompilado, por fari pli trafajn rimojn. *Averto:* la *Revuo* ne prezentos tiujn rimojn!

Complete Grammar, Alphabet and Pronunciation of Esperanto

THE ALPHABET

a, b, c, ĉ, d, e, f, g, ĝ, h, ĥ, i, j, ĵ, k, l, m, n, o, p, r, s, ŝ, t, u, ŭ, v, z.

The sounds of the vowels (a, e, i, o, u) are the vowel sounds in: "Are there three or two?" The consonant sounds are as in English, except: *c* as *ts* in *hats*, *ĉ* as *ch* in *church*, *g* as in *go*, *ĝ* as *g* in *gem*, *ĥ* as *ch* in *loch*, *j* as English *y*, *ĵ* as *z* in *azure*, *s* as in *so*, *ŝ* as English *sh*, *ŭ* as English *w*.

THE GRAMMAR

1. There is no indefinite article; there is only a definite article (*la*) alike for all sexes, cases and numbers.

2. Substantives end in *o*. To form the plural, *j* is added. There are only two cases: nominative and accusative; the latter is obtained from the nominative by adding *n*. Other cases are expressed by prepositions (genitive *de*, dative *al*, ablative *per*, etc.)

3. The adjective ends in *a*. Case and number as for substantives. The comparative is made by means of the word *pli*, the superlative by *plej*; with the comparative the conjunction *ol* is used.

4. The fundamental numerals (not declined) are: *unu*, *du*, *tri*, *kvar*, *kvin*, *ses*, *sep*, *ok*, *naŭ*, *dek*, *cent*, *mil*. Tens and hundreds are formed by simple junction of the numerals. To mark the ordinal numerals, *a* is added; for the multiple, *obl*; for the fractional, *on*; for the collective, *op*; for the distributive, the preposition *po*. Substantive and adverbial numerals can also be used.

5. Personal pronouns: *mi*, *vi*, *li*, *ŝi*, *ĝi*, *ŝi*, *ni*, *vi*, *ili*, *oni*; possessives are formed by adding *a*. Declension as for substantives.

6. The verb undergoes no change with regard to person or number. Forms of the verb: time *being* (present) takes the termination *-as*; time *been* (past) *-is*; time *about-to-be* (future) *-os*; conditional mood

-us; imperative mood *-u*; infinitive *-i*. Participles (with adjectival or adverbial sense): active present *-ant*; active past *-int*; active future *-ont*; passive present *-at*; passive past *-it*; passive future *-ot*. The passive is rendered by a corresponding form of the verb *esti* (to be) and a passive participle of the required verb; the preposition with the passive is *de*.

7. Adverbs end in *e*; comparison as for adjectives.

8. All prepositions govern the nominative.

9. Every word is pronounced as it is spelled.

10. The accent is always on the next-to-last syllable.

11. Compound words are formed by simple junction of the words (the chief word stands at the end). Grammatical terminations are also regarded as independent words.

12. When another negative word is present, the word *ne* is left out.

13. In order to show *direction toward*, words take the termination of the accusative.

14. Each preposition has a definite and constant meaning; but if the direct sense does not indicate which it should be, we use the preposition *je*, which has no meaning of its own. Instead of *je*, we may use the accusative without a preposition.

15. The so-called foreign words (that is, those which the majority of languages have taken from one source) undergo no change in Esperanto, beyond conforming to its orthography; but with various words from one root, it is better to use unchanged only the fundamental word and to form the rest from this in accordance with the rules of the Esperanto language.

16. The final vowel of the substantive and of the article may sometimes be omitted and replaced by an apostrophe.

worth repeating...



The World
Needs
ESPERANTO
NOW

"We have an axe to grind ---
the axe which cuts through the
barrier of language."

*International Stamp Collectors'
Association*

The great worldwide organization to promote Esperanto
for people of all nations, all religions, all political beliefs
IS



Universala Esperanto-Asocio

The *ONLY* North American organization affiliated with UEA is
Esperanto League for North America

Every member of the League is a member of UEA

Why not Join Us Now?